NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto Liceo
Atocha 98-4°.28012 Madrid
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz Julio-Aŭgusto 1993
*********************************************************************

**ESPERANTO: FENOMENO DE LA COMUNICACION**

Madrida Esperanto-Liceo disdonis ekzemplerojn al ĉiuj hispan-amerikaj Esperanto-asocioj, al Hispana Akademio pri Lingvo, kaj al aliaj gravaj bibliotekoj. MEL faris ekonomian klopodon por eldoni tiun-ĉi tradukon de la libro de W. Auld (La subvencio de Kultura Ministerio ne estis sufiĉe por pagi la koston) kiu povas esti utila al ne-esperantistoj. Bv rekomendi ĝin al viaj geamikoj kaj helpu al MEL en la vendado. Eble la libro ne estas la plej bona sed momente estas la plej aktuala hispanlingve por disvastigi Esperanton.

## HISTORIO DE MADRIDA ESPERANTO MOVADO

Skribita de Lupe Sanz kaj eldonita por GRAFIKADOS kun kovril-desegno de Antonio Mingote, aperis la numero 2 de la kolekto "Datos acerca del movimiento esperantista" . Temas pri du-lingva versio laŭ titolo "Historia del Esperanto en Madrido". Lupe kompilis, en 77 paĝ., multajn datumojn korektitajn kaj komentariitajn de diversaj esperantistoj.

**NOVA ELDONO DE MEL**

La tria eldono de MEl en tiu-ĉi jaro estas la dua eldono de "Datos acerca del movimiento esperantista". Ruiz, Juan Carlos y Fighiera G.C. Temas pri revizio de la numero 1 de la kolekto supre citita. (13 paĝ).

**HELPU AL MEL. AĈETU SIAJ VENDAĴOJN**

| | |
|---|---|
| "Esperanto: fenómeno de la comunicación". Auld, W ....... | 1.300 ptj |
| "Historia del Esperanto en Madrid". Sanz, Lupe .......... | 500 ptj |
| "Parolu Esperanton" Fernández Arroyo, J. ................ | 650 ptj |
| T-ĉemizoj "Esperanto" ............................... | 600 ptj |
| Adresaro de hispanaj E-grupoj ....sendu poŝtmarkojn po | 100 ptj |
| "Datos acerca del movimiento esperantista".poŝtmarkojn po | 100 ptj |

La prezo inkludas iva-on kaj sendokoston. Antaŭpago necese pere de poŝtĝiro al Esperanto-Liceo de Madrid. Atocha 98. 28012 Madrid. Por libroj 20% rabato se oni aĉetas pli ol 5 ekzempleroj. (pli ol 20 por T-ĉemizoj). NE SENDU ĈEKON.

**JUNA ESPERANTO GRUPO EN MERIDO**

La semo de Paco Cabezas fruktodonas, en Merido jam ekzistas juna movado kiu organizis semajnfinan kampadejon meze de majo, apud la rivero Guadiano. Antaŭen Santiago kaj Yolanda.

## NOVA HELECO

La revuo de Astura Esperanto-Asocio havas novan aspekton: Pli bona kompostado kaj kvalito en du-lingva eldono. Nur unu afero, ni sugestas uzi malsimilajn literojn por esperanta kaj hispana versio.

**N I A V O Ĉ O**
**Organo de Madrida Esperanto-Liceo**
**Atocha 98-4°. 28012 Madrid**
**Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz** **Julio-Aŭgusto 1993**

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO
Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4°
Marde/ĵaŭde, ekde la 18.00 h. ĝis la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3°-7). Aliaj tagoj uzu automatan respondilon: (91) 446 80 79
Venontaj prelegoj, lunde je la 19.00h en Atocha 98-4°:
**12-a de julio "Antaŭhispana UK". Konversacia rondo.**

**SPECIALA KURSO DE ESPERANTO**
Fernando Moral gvidis bazan kurson ĉe "Federación espiritista española". Unu fojon semajne li instruis gramatikon kaj komentis rilatojn inter Esperanto kaj spiritismo pere de tekstoj eldonitaj ĉefe de brazilaj esperantistoj-spiritistoj.

**EMILIO HERRERA ENTOMBIGITA EN GRANADO**
Ekde Bruselo, kie mortis ekzilita, revenis al Granado la kadavro de generalo Herrera. En Madrido grava esperantisto en la tridekaj jaroj kaj fondinto de la Klubo "Aeropopular" kie enkondukis Esperanton, Lucrecia San Antonio estis unu el la profesorinoj. La urbodomo de Granado honoris al generalo, Prezidanto de la Hispana Respubliko en la ekzilo. Dum la akto, Lucrecia parolis pri la laboro ene de Esperanto-movado de S-ro Herrera

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ** (Aliĝiloj ĉe MEL)
LITERATURA FORUMO EN BARCELONO. 17-a ĝis 22-a de julio
78-a ANTAŬKONGRESO EN BARCELONO. 20-a ĝis 23-a de julio.
78-a U.K. DE ESPERANTO EN VALENCIA. 24-a ĝis la 31-a de julio.
27-a Konferenco de ILEI. 31-a julio ĝis 6-a aŭgusto.Paterna(Valencio)
78-a POSTKONGRESO EN MADRIDO. 1 ĝis 6-a de aŭgusto.
49-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO. Vraca (Bulgario). 7-14a aŭgusto 1993. Aliĝo pere de Kataluna E-Junularo. Apdo. 32318.08080 Barcelona.
KULTURA ESPERANTO FESTIVALO. 19-22 aŭgusto. Kopenhago (Danlando)

**ĈU ESTAS UTILA ESPERANTO? (Pepe Platas)**
Mi pensas ke ĉiuj jam sciis la avantaĝon de la persono kiu lernas Esperanton, sed ĝi ankaŭ povos atingi aliajn. MEL faris historion en la movado esperantista pro diversaj aferoj, krom atingi amikojn ĉe nia klubo, vi povas ankaŭ atingi fiancojn edzinocele. Paro de konataj esperantistoj kiuj geedziĝis en la Liceo estas: Augusto-Alicia, Juan Carlos-Maribel, Juanjo-Loti.... kaj la listo povus esti tre longa. Nia konkludo estas: gejunuloj! venu al MEL, ne nur por lerni esperanton sed por trovi edz/in/on.

**"Nia voĉo" PARDONPETAS**
Ni tre bedaŭras ke kelkaj el niaj legantoj devis pagi al la Poŝto 30 ptjn pro ne sufiĉa afranko. Ekde nun ni metos korektan poŝtmarkon:13 ptj por Madrido kaj 17 por provincoj. Tiu-ĉi altigos la koston de nia bulteno kaj pro tio ni nur sendos al jenaj: membroj de MEL kiuj pagis 1993 kotizon, hispanaj esperantaj grupoj kiuj sendas al MEL siajn revuojn. Aliaj grupoj povas ricevi ĝin kontra_ 77 poŝtmarkoj de 13 ptj.(1.001 ptj)

## U.K V A L E N C I A.

**Ĉefaj atingoj de la LKK kaj helpantoj ĝis fino de majo**

**SENPAGA KONGRESEJO.** La normala luprezo estas 10.000.000 da pesetoj. Estas la unua fojo ekde _ia konstruado ke oni donas ĝin senpage al iu kongreso aŭ aranĝo.

Junulara restadejo, tre bela kaj tre malmultekosta, en natura loko ekster Valencio, kun naĝejo, sportejo, ktp., por **INTERNACIA INFANA KONGRESETO.** ĝin neniam oni cedis al iu aranĝo ne organizita rekte de la Generalitat. Ĝis nun aliĝis preskaŭ 50, inter infanoj kaj helpantoj, tio jam estas pli ol en Bergeno aŭ Vieno, kaj estos unu el la plej amasaj de la lastaj jaroj, laŭ la lastaj informoj de la direktoro, Chistopher Fettes. La infanoj ricevos diversajn donacojn, de entreprenoj kaj institucioj, kaj estos invititaj de la urbodomoj de najbaraj urbetoj BUÑOL KAJ CHESTE.

HOTELO PATERNA, tristela kaj klimatizita, por la **ILEI KONFERENCO.** La prezo, loĝado kun tri manĝoj, estos por la ILEI-anoj 2.500 pesetoj tage. Ni atingis tiun tre specialan prezon ĉar la LKK okupiĝis rekte pri tio. Nek UEA nek IBERIA (oficiala vojaĝagentejo) okupiĝis pri tio. Oni atendas la partoprenon de ĉirkaŭ 100 homoj el diversaj landoj. Tie okazos samtempe la Esperanta Gimnazio.

**AMASLOĜEJON** en Altlernejo Blasco Ibañez, proksima al la kongresejo, kun duŝejo, kaj tre malmultekosta kafejo-restoracio ĉefe por la kongresanoj kiuj venos el la nepagipovaj landoj. Tute **senpage**. Oni pagos simbolan prezon, por la tuta semajno 1.000 pesetoj, por pagi asekuron kaj donaci krommonon al la deĵorantoj. Oni rezervis lokon por 250 gekongresanoj. Tio ankaŭ sukceso de LKK nur ĉar pli "altaj" esperantaj instancoj ne interesiĝis pri tio. La prezo en Vieno kaj en Bergeno, en multe pli malbonaj kondiĉoj estis sepobla.

**1000 BELAJ AFIŜOJ**, de la Instituto Turístico Valenciano, kun la teksto de la kongreso. Tio kostas 500.000 pesetoj. Por ni, dank'al LKK, senpage.

**VIDEO** "Valencio, la perfekta loko", tradukita al esperanto en MADRIDO kaj eldonita de Valencia Convention Bureau. 250.000 pesetoj. Senpage.

**2500 plastaj sakoj** por la gekongresanoj, sufiĉe belaj, donaco de "EL CORTE INGLES", dank' al la helpo de la MADRIDANOJ.

**3000 DOKUMENTUJOJN** donaco de la entrepreno INALTEL SA, ankaŭ dank'al la helpo de la MADRIDANOJ.

Ni starigas kontaktojn kun entreprenoj "El Aguila" (biero), Coca Cola, kaj aliaj por inviti la gekongresanoj.

La KONSILANTARO PRI KULTURO subvencias la eldonon de la plej grava klasika poeto de Valencio en esperanto **"Poemaro de Ausias March"**, dulingva (Esperanto-valencia), la_ traduko de Abel Montagut. 1000 ekzempleroj, 500.000 pesetoj.

La ĈEFEPISKOPO de Valencio aprobis la okazigon de la **ekumena diservo en la Katedralo.** Eble partoprenos la madridan ĥoron.

Uzon senpage, dum la kongreso, de **kamioneto**, cedita de valencia entrepreno.

Dum la akcepto ĉe la urbodomo ĉiu partoprenanto (300) ricevos **SPECIALAN DONACON** de la URBODOMO, kun la logotipo de la UK. UEA-CO ricevos specialan donacon por siaj vitrinoj en Rotterdam. Ankaŭ estos kelkaj aliaj donacoj por la plej gravaj esperantistaj gastoj.

La **BLOVORKESTRO DE VALENCIO**, eble la plej bona el Hispanio, ludos senpage dum la Nacia Vespero. Dum tiu festo ankaŭ ludos tri elstaraj folkloraj ensembloj de CASA DE ANDALUCIA, CENTRO ARAGONES kaj la valencia grupo AZAHAR, kiuj ludos la plej interesajn kaj admirindajn kantojn kaj dancojn de Hispanio. Entute ludos ĉirkaŭ cent artistoj, kun muzikistoj, dancistoj, kantistoj, riĉe vestitaj per tradiciaj kostumoj.

La **KLASIKA ORKESTRO DE VALENCIO**, ankaŭ unu el la plej bonkvalitaj de Hispanio, ludos ankaŭ senpage, por akompani la **ĤORON "VERDA STELO" DE MADRIDO**, por la prezento, unua foje en la esperanta movado de

"Cantata" en esperanto, por orkestro kaj ĥoro, komponita de Pedro Vilaroig speciale por la UK, sur poemoj de Miguel Fernández.

La PROVINCA DEPUTITARO DE VALENCIO permesos la uzon, senpage, de la **TEATRO PRINCIPAL**, la ĉefa teatrejo de Valencio, por prezenti, en du tagoj, la teatraĵon "La vaguloj", ludata de la **BRITA TEATRA GRUPO DE LOO BROOKS.** La normala lukosto tage estas 530.000 pesetoj.

Interesa parto de la programo estas **KONCERTO DE KLASIKAJ GITAROJ,** fare de TRI PROFESIAJ ALTNIVELAJ KATALUNAJ GITARISTOJ sub la gvido de Joan Rafols.

La malaga **ROKMUZIKISTO** Eduardo Vargas "Solo" koncertos por la kongresanoj, ĉefe por la plej junaj, per sia tre speciala stilo.

Aliaj gravaj programeroj estos la **PRELEGO PRI GARCIA LORCA** de MIGUEL FERNANDEZ, la prezentado de **"IBERE LIBERE"**, kie partoprenos ankaŭ Miguel kune kun Camacho, Neves, Adúriz, Montagut, Valén kaj Vilaroig, kiel reprezentantoj de la plej juna ibera (Hispanio kaj Portugalio) esperanta kulturo.

Ankaŭ partoprenos la **INTERNACIA ĤORO**, kaj la **infana esperantista bulgara ĥoro "Verdaj steletoj"**. La jam konata kaj ege amuza kabaredo de **"F-ino Barlaston"**.

RAFAELA URUEÑA estas rektorino de la **INTERNACIA UNIVERSITATO.**

La interkona vespero konsistos el **GIGANTA PAELLA**, por 2.000 homoj, akompanata de "sangria", kaj dancado, ĉe la maro (en liberaera somera restoraci-ĝardeno, apud la sablo de la plaĝo), senpage por la kongresanoj.

Dimanĉe vespere okazos la **"Florbatalo"**, ene de la valencia foiro de Julio. Ĝi estas mirinda surstrata spektaklo, kavalkado kun folkloro, muziko, tradiciaj kostumoj, ktp., kiun la kongresanoj povos ĝui, same kiel artfajraĵoj, kiuj okazos fine de tiu florbatalo, kaj pri kiuj Valencio famas tra la tuta mondo.

Ankoraŭ atendas al gekongresanoj aliaj agrablaj **"SURPRIZOJ"**, kiujn ni ne devas nun rakonti.

Kaj la plej grava kaj agrabla parto de la UK en Valencio: ĉi tiu gastama urbo kaj regiono ofertas, ĉiutage, aŭ pli bone dirite, ĉiunokte, fine de la kongresaj aranĝoj, okazon promeni, noktumadi, vagadi tra kafejoj, trinkejoj, diskotekoj, eĉ tra la plaĝo, por ĝui tiujn kongresajn tagojn, je sufiĉe pli malalta prezo ol dum la lastaj UK-oj.